

NOTRE DAME DE PARIS = **Nia Sinjorino de Parizo**


Parizo, la 15an de aprilo post-tagmeze. Subite radio- kaj televid-elsendoj ĉesigas siajn normalajn programojn kaj eksciigas:

Brulas la katedralo Nia Sinjorino de Parizo!

Ne kredeble! Monumento el la plej famaj de Francio, aĝa je pli ol 800 jaroj, kaj konstante prizorgata! Kiel eblas tio? Iom post iom, la bildoj fariĝas pli teruraj kaj esploras spektantoj: nun, la tuta ĉarpentaĵo brulas; la sago-turo pleniĝas je flamoj kaj fine falegas, rompante malsuprajn volbojn.



Bildo1: Brulas tegmento kaj ĉarpentaĵo, dum ankoraŭ estas tago.



Bildoj 2 & 3: Fajrobrigadistoj luktas dum esploras spektantoj.

La evento estis tiom grava, ke la respublika prezidento S-ro Macron [Makro] rezignis pri sia parolado samvespera al la francoj!

Dum incendio la maltrankviliĝo estis maksimuma, kiam fajro ekatakis la maldekstran (nordan) turon.: Se ĝi estus brulinta, eble la tuta fasado estus ruiniĝinta!



Bildo 4:Subite falegas la centra sago-turo

Nur en la nokto, fajrobrigadistoj povis certigi, ke ili mastrumas l' incendion.

Preskaŭ tuj alvenis multaj mesaĝoj, kondolencaj kaj kuraĝigaj de fremdaj landoj: Nia Sinjorino de Parizo estas konata de multaj turistoj kaj tiom fama kiom Eĵfel-Turo! Ankaŭ rapide alvenis proponoj de mon-helpo por restaŭri la edificon, donacoj de multaj francoj (el kiuj kelkaj riĉeguloj!) sed ankaŭ de nefrancoj. Jam 3 tagojn poste, la sumo de promesitaj donacoj superis 1 miliardon da eŭroj!

Bildo 5:Skafaldo ruiniĝinta

Sed antaŭ ĉio, necesas analizi la damaĝojn, sekurigi volbojn kaj murojn kaj ankaŭ malmunti la skafaldon. Tiu skafaldo estis muntita supre de la ĉefa navo por renovigi la sago-turon. Tutcerte



l'incendio (kun temperaturoj ĝis 800°) malfortikigis ĝian strukturon.

Ĉu eblos rekonstrui saman ĉarpentaĵon?

Por konstrui la subtegmentejon spertaj ĉarpentistoj uzis multajn labojn el kverko (pro la nombro de uzitaj arboj, la ĉarpentaĵon oni nomis *l'arbaro*). Vere impresaj dimensioj: 100m longe, 13 larĝe – super la navo- kaj 10m alte. Ekzistis unua ĉarpentaĵo super la ĉorejo en la jaroj 1160-1170, sed ĝi malaperis, poste oni starigis la novan de 1220 ĝis 1240, kun forta deklivo (55°): Ĝuste tiu malaperis en aprilo 2019 post preskaŭ 100 jaroj! Tri militoj okazis, kiuj ne atingis ĝin: la franca-prusa milito en 1870/71, la Unua Mondmilito, kiam grandega germana kanono (la fama Grosse Bertha) bombardis Parizon. Poste la Dua Mondmilito, ĉe kies fino Hitler minacis bruligi la tutan urbon.

El kio konsistis la tegmenta kovraĵo?



Bildo 6: Tradicia tegmento el plumbaj ladoj. Ĉu ĝi ekzistos plu?

Ĝenerale dum mezepoko tegoloj el kuirita lomo estis uzataj, sed pro la distanco al la provizejo, arkitektoj preferis elekti plumbon kiel kovran materialon: **1326 ladoj el plumbo** dikaj je 5 mm, kiuj pezis pli ol 210 tunojn!

Estimata leganto: en la revuo KONSTRUADO –kajero 2020 nepre aperos kompleta artikolo pri la ĉarpentaĵo kaj la tegmento de Nia Damo de Parizo. Ankaŭ pri la projektoj de restaŭrado.